

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 42-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2018 N-ro 172

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero.*

Indekso

Libroŝranko

Brunilde M. do Espírito Santo 1

Amikoj de Lorenz 2

Mesaĝo de la Estraro de Lorenz 2

Kuriozaĵoj el la Leteroj
de Zamenhof 3

Vivo Feliĉa 3

Antaŭen! 3

Tri Grandaj Virtoj

Três Grandes Virtudes 4

Esti Patrino

Ser Mãe 4

Esperantistoj Renkontiĝas
en la Paraíba Valo 5

Bet-55 Bulteno - Pri La

55-Aj Baltiaj Esperanto-Tagoj 5

Recepto 6

Sinprezento 7

Via Aliĝo (Realiĝo) Estas Vera
Trezoro por Lorenz kaj Centoj
da Geesperantistoj
en la Tuta Mondo! 8

LIBROŜRANKO

Kiam ni fondis la spiritisman organizaĵon “Hejmo de Tereza”, en Rio-de Janeiro, Brazilo, ni ricevis de fratamiko la permeson uzadi lian apartamenton en granda konstruaĵo. Ĉi tiu konstruaĵo havis du komercajn ĉambrojn: unu el ili disponigas al ni por starigi rabataĵo-bazon; la alian li modifis por nia grupo starigi spiritisman librovendejon.

Inter tiuj du ĉambroj troviĝis la enirejo de la apartamentoj. Post kiam ĉio jam estis preparita, ni ricevis de la Spirito Bezerra de Menezes, pere de la mediumo Francisco Cândido Xavier, sugeston, ke ni instalu libroŝrankon ĉe la enirejo, kaj ke ni metu en ĝi bretojn, kaj, sur unu el ili, malfermitan libron, por ke la preterpasantoj legu ĝiajn mesaĝojn. Ĉiutage ni elektis konsolan kaj pripensigan tekston.

Iam ni ricevis neatenditan viziton de ploranta sinjorino, kiu serĉis nin por rakonti sian dramon.

Longan tempon ŝi vivis en intensaj diskutoj kun sia edzo. Tiam, ankoraŭ ne estis divorco, kaj ŝi ne volis fariĝi eksedziĝinta virino. En tiu mateno ŝi decidis solvi la problemon, elektante la falsan vojon de memmortigo. Tamen, ŝi ne volis sin mortigi per skandala maniero. Verdire, ŝi volis, ke neniu trovos ŝian kadavron. Ŝi ekpensis sin ĵeti en la maron. Tiel, ŝi fiksis tian ideon kaj preparis planon: ŝi eliros el sia domo kune kun la servistino, sciigante al la familianoj, ke ili iros al la superbazaro. Tie ŝi petos al la servistino por iri al alia butikoj kaj ŝi sekvos en la direkton de la maro, kaj tie sin mortigos. Tion ŝi faris kaj petis la servistinon iri al la proksima butikoj. Sekve, enbusiĝis kaj proksime de la loko, kie ŝi sin memmortigos, ŝi sonorigis, sed la ŝoforo ne aŭdis kaj la buso haltis ĉe alia haltejo, ĝuste

antaŭ la libroŝranko de la “Helmo de Tereza”. Ŝi ekvidis la librojn, alproksimiĝis kaj ĝuste en tiu tago la libro malfermita estis “Memoraĵoj de Sinmortiginto”.

Tuj post la ekvido de tiu libro, ŝi memoris, ke ŝia kara patrino konis la mediuminon de tiu verko, Yvonne do Amaral Pereira. Ŝi sciis pri la eldono de tiu libro, sed neniam ĝin legis. La emocio ekposedis ŝian koron kaj, konvulsie plorante, ŝi supreniris la ŝtuparon de la konstruaĵo, kie bonkoraj homoj ŝin ricevis kun malfermitaj brakoj. Ŝi rakontis sian dramon kaj sian intencon sin mortigi. Post frateca konversacio kaj klarigoj pri la falsa pordo de memmortigo, ŝi rezignis tiun ideon.

Jen historio de libroŝranko.

Plurfoje mi pensis: kial ni ne metu tiajn mesaĝojn kaj librojn sur gazetbudojn, parkbenkojn kaj aliajn ejojn, por ke la homoj kun samaj kaj aliaj dramoj havu la eblecon elekti aliajn vojojn?...

Brunilde estas la fondintino de la “Hejmo de Tereza”, 96-jara, verkis pli ol 20 spiritismajn librojn kaj ĝis nun estas tre aktiva laborantino.



Brunilde Mendes do Espírito Santo
– Brazilo –



AMIKOJ DE LORENZ



Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia estas unu el la plej simpatiaj geedzoj de la esperantista movado. La paro estas aktivega por la internacia lingvo Esperanto, same kiel en la filantropa laboro. Ambaŭ estas fondintoj kaj administrantoj de la Fondaĵo Bona Espero, en Alto Paraíso de Goiás, Brazilo, kiuj jam dum 40 jaroj ĝin gvidas. Ursula kaj Giuseppe konstante ĉeestas la kunsidojn de Lorenz en la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Ili estas, sendube, amikoj de Lorenz!

“En la esperanto biblioteko de nia institucio Bona Espero la serio de Almanako Lorenz estas inter la plej konsiderataj dokumentoj, kiujn konsultas kaj legas niaj internaciaj gastoj kaj volontuloj.

Ni sincere gratulas vin pro la persista kaj ĉiam tre interesa agado!

Admirinda estas la vasta reto de porokazaj kunlaborantoj el la plej diversaj mondkonceptoj. Same la ‘Komunikoj’ eldonataj regule estas ĉiufoje inspiraj.

Nepre vi devas daŭrigi sur tiu vojo semi la bonan novaĵon!”

Ursula kaj Giuseppe



Ursula kaj Giuseppe ricevas la Medalon de Toleremo de la Fondumo Zamenhof (Bjalistoko)

LORENZ

“KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 42-a – n-ro 172 | Oktobro-Novembro-December 2018

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonaĵoj: ☎ + 55-21-984854539 - 📞 + 55-21-2450-4768
Skaĵpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>

MESAĜO DE LA ESTRARO DE LORENZ

La 24-an de decembro, kun granda ĝojo, Eldonejo Lorenz kompletigos siajn 43 jarojn kaj ni volas, tutkore, nome de la Estraro kaj Konsilantaroj de Lorenz, danki al ĉiuj kunlaborantoj de nia Asocio, private al niaj karaj anoj, kiuj la tutan jaron, vere subtenas nian modestan laboron.

Ĉi-tiu jaro ni lanĉis la verkon, en la portugala lingvo, “Eu te amo, meu filho” (“Mi amas vin, mia filo!”), kaj en Esperanto, la librojn “La senditoj” kaj “La laboristoj de la eterna vivo”, kune kun Brazila Spiritisma Federacio. Ni pliatentigas, ke la libroj en Esperanto ni ilin disdonas al dekoj da landoj, tute senpage. Inkluzive, se niaj karaj gelegantoj, ekster Brazilo, volos ricevi niajn librojn, en Esperanto, petu, kaj kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi.

Kompreneble, ni ne povas forgesi la trimonatan bultenon Komuniko kaj la jarlibron Almanako Lorenz, ambaŭ legataj en pli ol 100 landoj! Pri Almanako Lorenz, ni reliefigas, ke ĝi ricevas la prestiĝon de eminentaj verkistoj el la plej diversaj landoj kun belaj neeldonitaj kronikoj. Cetere, ni ĉiujare lanĉas la Almanako(n) Lorenz ĉiam okaze de la Universala kaj Brazila Kongresoj de Esperanto. Do, karaj gelegantoj en Brazilo kaj en la tuta mondo, ni elkore vin dankas! Ke via Kristnasko estu plena je amo kaj frateco kaj ke 2019 estu fruktdona por ni ĉiuj!

“Vivu, kresku kaj floru la verda standarto!” (L. L. Z.)

La Estraro – Eldonejo Lorenz



Kompostita de Rogério Mota

Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al Majnov 1889

Estimata Amiko!

La 1 rublon 17 kop. por la venditaj 3 gramatikoj, unu granda kaj 1 malgranda vortaro – mi ricevis. Pro via letero al Max Müller mi tute ne koleras vin, ĉar mi scias tre bone, ke via deziro estis la plej bona kaj vi volis alporti utilon al nia afero.

La ĵurnalo elirados en la unua tempo unu fojon en la monato; sed se ĝi estos sufiĉe subtenata de la amikoj, ĝi post komencos eliradi ĉiusemajne. Unutempe kun la ĵurnalo elirados ankaŭ aparte “Kolekto da novaj verkoj en la lingvo Esperanto”. El Aŭstralio, kiom mi memoras, mi ricevis leterojn internaciajn el Melbourne kaj el unu urbeto proksime de Sydney; sed de tiuj sinjoroj mi ne ricevis nek formalan promeson nek adresojn, kvankam iliaj leteroj estis skribitaj tre varme. Mia plena nomo estas Ludvigo Lazaro (Ljudovik Markoviĉ Z-f). La nomarojn mi sendis al vi hodiaŭ. (Mi sendis la Nomarojn por Februaro, ĉar el la plej novaj nomaroj mi jam ne havas eĉ unu ekzempleron.)

Al Majnov, 1889

Estimata Amiko!

Cenzuriston en Varsovio mi jam havas, kaj baldaŭ komencos eliradi novaj verkoj. Mezajn vortarojn en diversaj lingvoj mi ne povas nun ankoraŭ eldoni pro manko de mono. Sed, kiam mi nur havos la eblon, mi penos eldoni plej baldaŭ la mezan vortaron internacia-francan kaj poste internacian-rusan.

(Fonto: Iom Reviziita *Plena Verkaro* de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)



KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

Antaŭen!

Antikvaj Grekoj kantis la peanon,
Ni kantu do similan kanton, fratoj.
Kun ĉiu tag' malnovan la Adamon
De ni forviŝas teraj sortobatoj.

Triumfu ni la venkon kaj per laŭroj,
La kapon ni ornamu, sen fiero,
Ke per la volo nia Minotaŭroj
Fortrotas de l' supraĵo de la Tero.

Heroojn oni ekkonas per spirito
Bravega ĉiam dum la sangbatalo.
Ni estu bravaj antaŭ l' Infinito,
Sed ne forfalu antaŭ la Fatalo.

Ni do memoru tempon de Spartanoj,
Kaj estu fida voĉo nia kanto.
Antaŭen, marŝ!, al voj' samideanoj,
Ĝis fina venk' de nia Esperanto!

Aleksandro Dombrowski (Spirito)

Luís da Costa Porto Carreira Neto (Mediumo)

El la libro *Mediuma Poemaro* (FEB)

Vivo Feliĉa

Atentu pri la negativaj moralaj fantazioj,
kiuj efikas la kampon de la sekso, kaj de per-versiĝa emocio.

Ili enradikigas en la mensaj ekranoj,
kaj kreas afliktigajn dependencojn,
kiuj transformiĝas en malekvilibrojn kaj turmentojn.

Kion vi kulturu per la imagpovo, tio povas fariĝi helpaĵo, se nobla, aŭ fantomo, se vulgara.

Estas gravaj moralaj agoj sur la fizika kampo, sub instigo de halucinaj mensaj pasioj.

Pensu kaj agu harmonie.

Kulturu edifajn ideojn, kaj vi estos feliĉa.

Libro: *Vivo Feliĉa*

Spirito: Joanna de Ângelis

Mediumo: Divaldo Pereira Franco - Brazilo

TRI GRANDAJ VIRTOJ

Tri grandaj virtoj estas de l' kristano
Ornam' tre bela, granda de valoro,
Pli granda eĉ ol oro, eĉ ol sano;
En ĝojo ili brilas, en doloro.

Se en sufer' malĝojas via koro,
Se mankas mon' al vi, aŭ eĉ la pano,
Kuraĝe luktu kontraŭ la angoro,
Per KRED' fortiĝu la agema mano.

En tagoj de sufero, la ESPERO
Konduku vin kaj venkon al vi donu!
Kristanan AMON eĉ la fato sever'

Respektas, kaj neniam ĝin detruas.
Kristano ĉiujn amu kaj pardonu
La ŝuldojn, kaj ĉielon vi kontruas.

TRÊS GRANDES VIRTUDES

Três grandes virtudes constituem
O belo ornamento do cristão;
Seu grande valor é maior do que o do ouro
Ou até mesmo do que a saúde.

Se no sofrimento se contrista teu coração,
Se te falta dinheiro ou até mesmo o pão,
Luta com coragem contra o desalento,
pela FÉ se fortaleça tua operosa mão.

Nos dias de sofrimento, a ESPERANÇA
Te conduza e te dê a vitória!
Até o severo fado respeita o AMOR cristão

E nunca o destrói.
Ama cristãmente a todos, perdoando as culpas,
E construirás o céu.

Fonto: *Reformador*, julio 1946, p. 147
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

ESTI PATRINO

Esti patrino jen sin dividi en pecojn,
Du estuloj en unu kaj unu en du.
Havas patrino tiom da strangaj ecoj,
Intuicioj, antaŭsentoj, tiel plu...

Patrineco tamen venas post akuŝo,
Tiu ĉi estas nur korpa, interkrura.
Kiu patrinas, tiu flegas, jen per tuŝo
Ŝi doloron forigas per nur kiso.

Al gefiloj ĉiam ligata per ŝnuro,
Patrino ne laciĝas ĉion zorgi,
Kaj mamnutras, kaj lulas kaj vindas.

Estulo kiu en plurajn sin dividas,
Patrino fariĝas parto de la filo,
Kiun Nia Patro igis de ŝi parto.

SER MÃE

Ser mãe é dividir-se em dois pedaços,
É ser um Ser em dois e dois em um,
Renunciar a si mesma, renascer,
Estando separados sofrer juntos.

Ser mãe é celibato, algo profundo,
É renúncia aos prazeres neuronais,
Provar ao filho que a intuição
Provém do fundo d'alma e coração.

Maternidade vem depois do parto,
Que este é corporal e animal,
Quem cuida vela, zela e conduz.

Mãe amamenta e dá carinho farto,
É parte de quem é parte de si,
É pedaço de Ser, Vida e Luz.

Célio F. Martins



ESPERANTISTOJ RENKONTIĜAS EN LA PARAIBA VALO

Je la 18-a de novembro 2018 okazis unu plia entuziasma Renkonto de Esperantistoj en la Paraíba Valo - regiono inter Rio-de-Janeiro kaj San-Paŭlo, kie situas la viglaj Esperantogrupoj. Ĉi-foje, en la urbo Paraíba do Sul, en ĉambroj de municipa lernejo, sub gvido de Luiz Alberto Coelho, loka veterano. Partoprenis trideko da samideanoj el naŭ urboj. La eventon aŭspiciis Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro.

En la programo, oni prezentis prelegojn pri "La Origino de Demokratio" (P.S.Viana), pri "La Kvin Fazoj de la Esperanta Literaturo" (F. Pita), pri "Guto da Gramatiko" (P.S.Viana), pri "Investado je Krudaj Varoj" (J. Linck).

Okazis ankaŭ diskutoj pri SAT kaj pri la Esperanta komunumo. Oni prezentis enkondukon de la lingvo al novuloj, pere de lingvaj ludoj (Vitor Mendes). Krome, oni variatis per pluraj kantoj en Esperanto, fare de Miguel Klav, Dirce Sales (kiu lanĉis novan kanzonon originale verkitan en nia lingvo) kaj Tânia Paixão (kiu krome proponis etan pantomimon vestite kiel Chaplin). La tuta etoso estis tre entuziasma.

Dum la evento funkciis eta libroservo kaj budeto de Esperantaĵoj.

(Informas Luiz A. Coelho kaj Paulo Sergio Viana)



BET-55 BULTENO - PRI LA 55-AJ BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ

Estimataj kaj karaj,

Litova Esperanto-Asocio invitas partopreni la 55-ajn tradiciajn Baltiajn Esperanto-Tagojn, kiuj okazos la 6-14-an de Julio, 2019 en Litovia urbo Panevėžys. Detalaj informoj estas en la informa bulteno de BET-55 http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET55&page=1&sn1=&divpage=1&n=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=16&PHPSESSID=6d6b00f05f8a0c335fbe898066b16b2d

Retejo de BET-55, kie eblas trovi chiujn aktualajn informojn, estas

<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55>

Reta alighilo al BET-55 estas ĉi-tie http://esperanto.lt/aligxilo_BET.html?ckattemp=1

Partoprenu mem kaj invitu la aliajn. La arango estos vere multnombra, interesa kaj utila.

Amike,
Povilas Jegorovas
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

RECEPTO



Abel Sidney

- Avĉjo, vi bezonas mem estas de kolora kolirio!
— Kiucele?
— Forigi tristecon...
— Mi ne estas trista, sed maltrankviliĝinta.
— Mi scias. Tamen, ne bonas vidi vin tia kaj, do, mi opiniis, ke ...
— Bonvolu diri!
— Ĉu ni promenu? Mi havas solvon por viaj okuloj.
— Sed bonfartas miaj okuloj!
— Ne. Videblas, ke senbrilaj ili estas. Pri okuloj mi spertas, Avĉjo!
— Ĉu vere?! Kion vi diras?
— La radiko de tio estas ĉe Avinjo, kiu instruadis min observi la okulojn de la homoj, por ke mi malkovru iliajn pensojn...
— Ĉu vi faras tion?
— Kompreneble. Mi obeas ŝin.
— Ordinare, kion vi vidas?
— Oho, ĝuste tion, kion homoj pensas!
— Ĉu vi legas pensojn, do?
— Ne, Avĉjo. Mi sentas tion, kion ili pensas kaj volas, ĉu vi komprenas?
— Nur per okul-observado?
— L'okuloj parolas, ploras, ridas, kaj foje, eĉ krias. Vi nun ridas kaj malkredas, Voĉjo. Tamen, tio estas la vero.
— Mi ne moketas vin, Viktorja. Mi estas perpleksa!
— Kion signifas 'perpleksa'
— Nu, kvazaŭ enabismiĝinta, mirplena, terurita...
— Pro la okuloj de la personoj?!
— Ne. Pro vi, kara!
— Sed mi fartas tute bone, Avĉjo. Mi lernis kontroli min, perceptante tion, kion la aliaj sentas...
— Ĉu vi ne timas?
— Foje, jes. Precipe tiam, kiam ili pensas pri vivo-forlaso.
— Ĉe kiu vi perceptis tion?
— Voĉjo, temas pri sekreto. Avinjo diris al mi, ke aferoj tiaj estas konfidencaj. Mi eĉ notis tion, por ke mi ĉiam memoru la averton.
— Prave! Ĉu tiu homo volis mortigi sin?
— Fakte, ne. Li volis nur morti, malaperigi sin, elŝteliĝi el la mondo. Mi perceptis lian profundan doloron...
— Ĉu doloro nekuraĉebla?! Simila al tiu diskreviganta la koron?
— Ne, Avĉjo! Ne temas pri doloro pro ektimo mortig-rapida. Alie, temas pri doloro, kiu igas onin treni sin, simile al homoj perdintaj en la dezerto de la vivo, soifoplenaj kaj malhavantaj celojn.
— Kaj kio pri tiu persono? Ĉu li resaniĝis aŭ forpasis?
— Li nek forpasis nek mortigis sin! Mi donos etan helpon, por ke vi malkovru pri kiu mi parolas: laŭŝajne vi konas lin...
— Ĉu mi konas lin? Ĉu estas nia familiano?
— Jes.
— Ĉu pli intima?
— Jes.
— Ĉu via patro?
— Maltrafe!
— Ĉu via patrino?
— Ne.
— Do, restas nur...
— Vi, Avĉjo!
— Mi?! Kiam mi volis dezertiĝi el la vivo?
— Tiam, kiam oni akuzis vin, ke vi ŝtelis tiujn terpecojn.
— Jes, estas ege malagrabla memori pri tio!
— Tiam, mi tion diris al Avinjo: "Se li povintus, Avĉjo malfermintus truon kiel kaŝejojn...".
— Kion ŝi diris?
— Laŭvorte ŝi diris: "Diable! Ĉion mi jam faris, por ke li forgesu tiun temon. Tamen, sensukcese...".
— Oh, kara Cecilio!
— Tiam, mi memoris pri persono, la nura, kiu igus vin forgesi tion.
— Ĉu, do, la ideo estis via?
— Jes, Avĉjo! Mi telefonvokis onklon Junioro. Kaj mi perceptis lian tristecon dirinte ĉi-vortojn: "Mi helpas Paĉjon elsarki tiun 'dornon' el lia koro."
— Dio mia!!! Kian klopodon li faris!!! Mi sciigis, ke li eĉ vendis kelkajn bovojn por pagi la vojaĝkostojn. Plie, li havas naŭ gefilojn...
— Tamen, temas pri famili-afero, ĉu ne, Avĉjo?
— Estas pli ol tio, mia kara nepino! Estas multe pli... Mi senvortas... Brakumu min, mi petas.
— Nu, Avĉjo, ĉar vi jam scias la veron, ni refreŝigu l'okulojn. Venu kun Avinjo al la kampodomo de onklino Maria. Ŝiaj primoloj florplenas je vidindaĵo rara. Kaj tio estas vera kolora kolorio por niaj okuloj.
— Jes, kara. Ni tien iru!

SINPREZENTO

Saluton, mi estas Joel Muhire loĝanta en Rutshuru, orienta regiono de DR Kongo, en provinco Norda Kivuo. Mi naskiĝis en Julio 1989 en kristana familio 12-membra kaj travivis severe maldolĉan vivon, pro efektive malriĉeco kaj ekscesaj ĉiutagaj malsekurecoj. Mi eklernis Esperanton tute hazarde en 2008, kiam mi estis 19 jara! Okazis ke miaj du plej aĝaj fratoj vizitis s-ron Honoré Sebuĥoro Shumba, kiu parolis al ili pri Esperanto. Hejmenreveninte ili ankaŭ informis nin pri tiu mirinda nova lingvo! Mi eksentis, ke ene de du semajnoj mi ekparolos flue Esperanton. La internaj idealoj de Esperanto, pro kiuj mia entuziasmo ellerni ĝin, cetere grandiĝis. Mi avice, mi klopodis varbi plurajn fojojn novajn adeptojn kun tamen rimar-kinde vana klopodo.

La oftaj demandoj: kio estas Esperanto? Kie oni parolas ĝin? Kian avantaĝon ĝi donas ellerninte ĝin?... mi provadis klare respondi ilin, sed pli poste, evidentiĝis ke ilia celo estis tedi min per tiaj demandoj sen ia pretendo eklerni Esperanton mem. Do mi decidis ĉesi tro klarigi en tiaj senfruktaj diskutoj. Estas vaste konate, ke Rutshuru estas inter la plej danĝerplenaj regionoj de DR Kongo, tamen malgraŭ la intermitaj militaj invadpuĉoj kaj senĉesa sukcesa malsekureco, mi temerare kaj diligente promocias Esperanton. Jen miaj atingoj pro kiuj mi ege fieras:

- Duonhora dissendo de e-kurso dum 2 monatoj tra RACOU FM en 2012. Pro uzurpa milito far M23, mi fuĝis al Ugando.
- Duonhora dissendo de e-kurso dum 2 jaroj kaj duona tra la radio Alliance FM (2014-2016).
- Enkonduko de e-programo en la orfan elementan lernejon Njiwa (de 2014 ghis nun).
- Kreo de e-klubo Rondo Esperantista de Kiwanja «REK» en Junio 2017. Krom unu el miaj lernantoj, s-ro Innocent Makuza instruas Esperanton tra la radio RTEDH FM ekde Aŭgusto 2017. Li fojfoje partoprenas en miaj ĉiulundaj kursinstruaj dissendoj tra RACOVE FM.



Laŭ la slogano de Eamanele Rovere, muzikisto el Italujo (rigardu lian muzikaĵ-stokon: www.esperantofre.com/kantoj/kantomr1.com): «Unu kanto ĉiusemajne forpelas el ni la malĝojn», mi rimarkis krome, ke propagandcele, muziko transsendas ian mesaĝon al multaj personoj samtempe! Mi do ekkomponis kantojn, kiujn mi nun uzas dum miaj e-elsendoj (www.senopone.wordpress.com/albumo) kaj la publiko jam konvikiĝis, ke Esperanto estas vere parolata lingvo. La 2an de Septembro 2018, mi eĉ partoprenis en la konkurso de ĉiuj muzikistoj el Rutshuru, organizita de Kivu Green-kompanio. Mi kantis en Esperanto kaj fine de la konkurso, multaj admiris min. En Rutshuru, Esperanto ne plu estas io nova, danke al tiuj supre menciitaj radistacioj, kaj preskaŭ ĉiuj scias pri la efektiva ekzisteco de Esperanto.

Krom instruado, mi aktivas en aliaj asocioj: aktiva membro de Verda Stelano Klubo, (VSK), DKJO – Demokratia Konga Junulara Organizo, kies vicprezidanto mi estas ekde Aprilo 2018 kaj Ligo de Orient- Kongaj Esperantistoj - LOKE, kiun mi sekretariumas.

Mi estas fiera esti posendanto de Esperanto, ĉar danke al ĝi mia vivo tute aliĝis: mi havas bonajn korespondamikojn el ĉie kaj jam konatiĝis kun ses landoj de Afriko, kaj baldaŭ vizitos la 7an, Madagaskaron, por koncerti en la Unua Afrika Kongreso de Esperanto, kio estas ege mirinda por afrikanoj sed efektiva per Esperanto. Vivu Esperanto!



VIA ALIĜO (REALIĜO) ESTAS VERA TREZORO POR LORENZ KAJ CENTOJ DA GEESPERANTISTOJ EN LA TUTA MONDO!



Karaj geamikoj, alproksimiĝas la fino de jaro kaj ni refreŝigas vian memoron por ne forgesi vian realiĝon al NIA Asocio. Ni tutkore vin dankas, ĉar, sen via senavara kaj ĝentila kontribuo, ni ne sukcesus sendi niajn librojn al pli ol 100 landojn, tute senpage, kedu!


El la multaj mesaĝoj kiujn ni ricevas, el la plej diversaj partoj de la mondo, pri la senpaga disdonado de niaj libroj, jen sube kelkaj: Jen opinioj de eksterbrazilaj samideanoj, kiuj ricevas niajn senpagajn librojn:




Karaj geamikoj,
Kun granda ĝojo mi informas Vin pri ricevo de nova libro (La vivo en la nevidata mondo)
Mi finlegis kaj hungarigis (ne en skribita formo, nure enkapo) la libron: Post la MORTO.
Ĝi estis trege instruaja verko. Ekde nun mi alie rigardas la mondon.
Kun estimo el Slovakio:
Ladislav Koczkás Szilárd

Saluton,
antaŭ kelkaj tagoj tute surprize mi ricevis sendajn "Almanakon Lorenz 2017" kaj libron "La Vivo en la Nevidata Mondo". Grandegan dankon! Mi jam trailegis duonon de tiu ĉi libro, ege interesa libro. Tiel detale estas pritraktita la postmorta vivo en la spirita mondo, ke oni eksentas grandan agrabla vivo tie.
Ankoraŭfoje dankon!
Kore,
Rita Valčiukaitė
Litovio


Karaj gefratoj!
Hierauŭ mi ĝoje ricevis 2 novajn librojn: "La vivo en la nevidata mondo" kaj ĉi-jara ekzemplero de Almanako Lorenz. Kia granda ĝojo ricevi tiujn novajn materialojn! Nuntempe mi estas lernanta la libro "Post la morto" de León Denis. Estas la unua fojo kiun mi legas verkaĵon de tiu eminenta esperantisto. La libro estas interese kaj vere instruiga. Poste mi eklernos la librojn kiujn mi ĵus ricevis de vi. Mi estas ege danka al vi pro via afableco kaj granda bonvolemo. Frate mi vin salutas. DIO VIN BENU!
Raisel. Kubo



Estimataj, hodiaŭ mi ricevis vian pakon, kie troviĝis Almanako Lorenz 2017 kaj La Vivo en la Nevidata Mondo. Dankegon al vi! En la sumoo de la japana esperantisto Hori Jasuo mi maje legis vian antaŭan donacon "Post la MORTO", de Léon Denis. Ĝi estis interesa kaj utila, mi lernis pri la diferencoj inter luterana kredo kaj spiritismo.
Salute
Paita Pyhälä, S-ino, Finnlando



Karaj,
Viajn librojn mi en ordo ricevis kaj mi diligente legas la libron "Post la MORTO". La esperanto teksto estas tre utila por mi lerni el tiuj libroj. Ne nur la enhavo de tiuj libroj estas interesa, sed ilia lingvaĵo (Esperanto) estas por mi utila, mi multe lerni el tiuj libroj...
Mi estas feliĉa por havi ilin. Koran dankon al vi pro ili.
Mi kolektas viajn Almanakojn! kaj aliajn librojn de vi.
Amike salutas vin:
Edith el Hungario



Tre estimata dankas pro la sendado de "La Evangelio laŭ Spiritismo" kiun mi volonte kaj plezure legas.
Mi reciprokas elkore felicxon al vi kaj al viaj disciploj. Fartu bone kaj denove mi salutas. Senio Boschini el Treviso Italio.

